

Mi starigas botelon sur la tablon.
Je mets une bouteille sur la table.
La infano mortis.
L'enfant mourut.
La murdisto mortigis la infanon.
L'assassin tua l'enfant.

Ig igas verbon transitivan 2 foje transitiva. (ig rend 2x transitif un verbe transitif)

La infano manĝas pomon.
L'enfant mange une pomme.
La patrino manĝigas pomon al siaj infanoj.
La maman fait manger une pomme à ses enfants.

Dominique de Mestral
Nancy Fontannaz

La sekretario.

Invito de la Fotilara Muzeo en Vevey, jaŭdon la 16-an de novembro 2006 je la 18-a

Claude Piron konsentis traduki esperanten la tri paĝojn, kiuj gvidas la vizitantojn tra la pluretaĝa Muzeo.

Jen la informaĵoj estas presitaj; la estraro de la institucio de Vevey deziras festi tiun momenton kun esperantistoj. Vi do ĉiuj estas invititaj.

Simple anoncu vian ĉeeston al Francisko Randin aŭ perrrete (esperanto@citycable.ch) aŭ telefone (076 411 14 55). Dankon.

Lunde la 2-an de oktobro 2006

je la 20-a en la salono unuaetaĝa de la stacidomo CFF en Laŭzano.

Ni tabuumos, proverbumos, lautvoĉe cerbumos. Alivorte, ni parolos kaj paroligos unuj la aliajn per paroligaj ludoj !

(Dominique et Elisabeth de Mestral organiseront des jeux divertissants incitant les participants à parler en espéranto.)

Kalendaro 2006

lun 02/10/06	Paroligaj ludoj
lun 06/11/06	Dominique de Mestral prelegos
jaŭ 16/11/06	Invito al la Fotilara Muzeo en Vevey (vidu supre)
dim ??/12/06	Zamenhofa festo

(*): en la stacidomo de Laŭzano ĉe la unua etaĝo, super « La Bufedo » je la 20-a

Ne forgesu, ke la Informilo estas **via ilo**. Dankon pro sendado al ni de viaj originalaj artikoloj, antaŭ la 10-a de oktobro.

La redakcio

Laŭzana Esperanto-Societo

Société Lausannoise d'Espéranto

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22

+41 (0)76 411 14 55 * +41 (0)21 657 14 56

esperanto@isuisse.com <http://www.esperanto.ch/Lausanne>

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Laŭzana Esperanto-Societo

TEMARO

Babetaj kasrolaj babilaĵoj : Freŝaj rimenpastaĵoj (eo)	2
La ĝeneva Stelo: 3-an de oktobro kun Anita pri Turkio (eo; fr)	3
La Farmdomo : fino (Pavel Polinski) (eo)	4
Compte rendu : projection Gerda Malaperis (04/09/06) (fr)	6
William Auld forpasis / William Auld n'est plus (eo; fr)	6
Iĝ-ig, pri la aprila prelego de Claude Gacond (eo+fr)	7
Invito de la Fotilara Muzeo en Vevey, 16/11/2006 (eo)	8

Kaserolaj "Babetbabilaĵoj"

Oktobro komenciĝas : profitu de la lastaj freŝaj tomatoj longe maturiĝintaj sub la somera suno. Ili parfumos delikate vian pladon de pastaĵoj.

Mem ellabori pastaĵojn : certe tute eblas... Nekomplike... Vi bezonas nur iomete da pacienco. Ni sukcese ellaboris ilin dum esperanta enĉaleda ekskurso.

Freŝaj rimenpastaĵoj (*)**Konfritaj tomatoj parfumigitaj per mentfolioj****Etaj detranĉaĵoj de maljuna Parmezano**

(*) rimeno = *lanière, courroie pour exprimer la notion de "tagliatelles"*

Kvantoj por 4 personoj :

(supkulero = s.k.
kafkulero = k.k.)

La pastaĵoj

400 gr. da faruno
4 ovoj
1/2 k.k. da salo
1 s.k. da olivoleo
pastaĵfabrikilo (facile trovebla en multaj komercoj : Migros, Ikea – malmultkoste)

Tiu aparato permesos al vi pretigi ankaŭ aliajn freŝajn pastaĵojn kiel

spagetojn aŭ lazanojn.

1) En grandan bovlon verŝu la farunon kaj faru centre truon. Rompu la ovojn kaj deponu ilin tien kun salo kaj olivoleo.

2) Enmiksi ĉiujn almiksaĵojn kaj knedu mane la tuton ĝis obteno de densa pasto.

Kelkajn informojn : faruno enhavas glutenon kaj kiam oni bone knedas la paston, tiu substanco disvolviĝas en ĝin kaj helpas obteni bonan kunligon de la tuto. Tio faciligas la laboron.

3) Apartigu la paston laŭ 6 pilkojn kaj laboru per la aparato po unu pilkon foje. Komencu enmeti platigitan pilkon plurfoje trans la pli larĝa interspaceto (numero " 1 ") por bone etendi la paston. Ne zorgu, se en la komenco vi havas truetojn en la pasto kaj ne malkuraĝiĝu : trapasu plurfoje la paston en la interspaceton ĉiam faldante ĝin.

Poste, progresive uzu la aliajn interspacetojn (ĉiam plurfoje) ĝis numero " 5 " (ne estas la plej maldika pozicio). Kiam vi obtenos maldikan sentruan ortangulon, enmetu ĝin en la parton de la aparato, kiu tranĉas la rimenpastaĵojn.

4) Pendigu la rimenpastaĵojn aŭ kuŝigu ilin sur farunitan pladegon, ĝis vi kuiras ilin.

Vi povas ankaŭ sekigi ilin por venontaj tagmanĝoj.

Iĝ-ig, pri la aprila prelego de Claude Gacond

Pri transitiveco kaj netransitiveco, la PIV skribas : ... « Verba formo ne estas uzebla ĝuste, se oni ne studis zorge ĝian difinon kaj la donitajn ekzemplojn ». André Cherpillod en "Lingvaj Babilaĵoj" skribis interesan ĉapitron, kies titolo estas : Transitiveco, tikla afero. Claude Gacond rakontis al ni, ke kiam Edmond Privat defendis esperanton ĉe la Ligo de Nacioj, en 1922, la plej grava kritiko de Edgar von Wahl estis : esperanto ne estas regula ĉar iĝ ne ĉiam signifas : fariĝi (*devenir*). E. Privat ne kapablis respondi. Nur post 40 jaroj, malfrue vespere, li telefonis al Claude Gacond, ĉar li subite malkovris la respondon al E. von Wahl : « Kiam la verbo estas transitiva, iĝ simple netransitivigas ĝin; kiam la verbo estas netransitiva iĝ nur signifas : komenci, fariĝi ».

Transitiva verbo celas objekton, rektan aŭ nerektan ; la ago ekiras de la subjekto kaj pasas al objekto.

Ekz. : Petro instruas gramatikon (rekta objekto) al infanoj (nerekta).

Petro instruas infanojn (rekta) pri gramatiko (nerekta).

Maria helpas al sia patro (ne rekta) = Maria helpas sian patron (rekta).

Netransitiva verbo ne celas objekton, la esprimata ago koncernas nur la subjekton.

Ekz. : Karlo bone dormas (netransitiva verbo).

La fajro brulas (netransitiva verbo).

Sed : La fajro bruligas la domon (transitiva verbo).

IĜ igas verbon transitivan netransitiva.

(iĝ rend intransitif un verbe transitif)

La knabaĉo rulas sian fratineton laŭ la deklivo. (*Le garnement fait rouler sa petite sœur dans la pente.*)

Oni rulas fratineton laŭ la deklivo. (*On fait rouler une petite sœur dans la pente.*)

Ruliĝas fratineteto laŭ la deklivo (*la verbo transitiva iĝis netransitiva en la mediala voĉo, kiu esprimas tie nevolan, nekonscian procezon.*) (*Une petite sœur roule dans la pente (involontairement).*)

Fratineteto rulas sin laŭ la deklivo (*la refleksiva voĉo esprimas agon faratan vole, konscie.*) (*Une petite sœur se roule dans la pente (volontairement).*)

IĜ markas la komencon de ago ĉe verbo netransitiva.

(iĝ marque le commencement d'une action chez un verbe intransitif)

Mi kuŝas sur la lito.

Je suis couché sur le lit.

Mi kuŝiĝas sur la lito = Mi ekkuŝas sur la lito.

Je me couche sur le lit (Je commence l'action de me coucher).

Ig igas verbon netransitivan transitiva.

(ig rend transitif un verbe intransitif)

Botelo staras sur la tablo.

Il y a une bouteille sur la table.

Compte rendu: 04/09/06Projection « Gerda Malaperis »

Durant la dernière séance, nous avons visionné le film Gerda Malaperis, tiré du fameux roman de Claude Piron, et filmé au Brésil. Pour ceux qui ne le connaîtraient pas encore, il s'agit d'un petit roman en espéranto, écrit avec le souci qu'un nouveau venu dans le monde de l'espéranto puisse progresser au cours de sa lecture. Construit comme un roman policier, avec un vocabulaire s'étoffant au cours des chapitres, ainsi que d'excellents exercices dérivés, il tient le lecteur en haleine jusqu'à son terme, où une surprise l'attend.

Si vous voulez vous laisser tenter par une entrée pleine de suspens et tout en douceur dans le monde de l'espéranto, je ne peux que vous conseiller chaudement ce roman, livre d'étude et de plaisir de tant d'espérantophones.

Le film, quant à lui, est très agréa-

ble à regarder, montrant une bonne maîtrise au niveau de l'image. Les dialogues sont bien enregistrés, et les acteurs offrent une variété d'accents et de vitesses d'élocution, permettant de se faire l'oreille de manière moins académique que ne le proposent certaines vidéos d'apprentissage des langues. Le sous-titrage est disponible, entre autres, en français et en espéranto, et le film est distribué au format DVD hors zone.

Pour commander le film par internet: <http://www.imagufilmo.org/>

Une rumeur circule selon laquelle ce film pourrait bientôt être disponible directement à la société lausannoise, je ne manquerai pas de vous tenir informés si elle se confirme.

Pour lire le livre illustré en ligne et faire les exercices associés: <http://ikurso.esperanto-jeunes.org/fr/gerda/>

Laurent

William Auld forpasis.

La skoto William Auld, unu el la plej eminentaj verkistoj kaj poetoj de Esperanto, plurfoje proponita por la Nobel-premio ekde 1999, forpasis la 11an de septembro 2006.

Ampleksa prezento de tiu aŭtoro aperas esperantlingve, ankaŭ franclingve ĉe :

eo : http://eo.wikipedia.org/wiki/William_AULD

fr : http://www.recherche.fr/encyclopedie/William_Auld

William Auld n'est plus.

L'Écossais William Auld, l'un des écrivains et poètes les plus éminents de l'espéranto, plusieurs fois proposé pour le prix Nobel de littérature à partir de 1999, est décédé le 11 septembre 2006.

Une ample présentation de cet auteur apparaît en espéranto, respectivement en français, sur :

Preparo de la tomata saŭco

- 6 mezgrandaj tomatoj
 - 6 ajleroj tranĉitaj pecete
 - 2 cepoj tranĉitaj pecete
 - 2 k.k. da sukero
 - 2 s.k. da timiano kaj origano hakitaj
 - 1 k.k. da kareo
 - 5 branĉetoj de freŝa mento
 - salo
- iomete da kapsiko en pulvoro (nur pinto de tranĉilo)
- olivoleo
- 80 gr. da detranĉita maljuna Parmezano

1) En bolanta akvo mergu tomatojn dum 1 minuto kaj retiru ilin sur pladon. Senŝeligu ilin (estas tre facile), tranĉu ilin en du partojn, kaj forĵetu la kernetojn. Tranĉu la ceteran karnon de la fruktoj en pecoj de 3-4 centimetroj.

2) En kaserolon deponu la karnojn de la tomatoj kun 1 s.k. da olivoleo kaj kuiru dum 15 minutoj.

3) Al la tomatoj aldonu la tranĉitajn ajlerojn, cepojn, timianon, organon, salon, sukeron, kareon kaj kapsikon (atentŭ ĝi forte spicas !). Kuirŭ ĝis kiam ne plu estas akvo inter la konfititaj tomateroj.

4) Haku mentajn foliojn kaj lasu aparte kelkajn foliojn por ornami la telerojn kaj almiksu la hakigitajn en

la saŭcon. Lasu kuiru ankoraŭ 3 minutojn. Aldonŭ 3 s.k. da olivoleo. Gustumu por eventuale korekti la kvanton da salo laŭ via gusto.

Kuirado de la pastaĵoj :

En granda kaserolo plena de akvo aldonŭ 1 kafkuleron plenigitan je salo. Kaj kiam la akvo bolas, enakvigu la rimenpastaĵojn kaj kuiru 4 aŭ 5 minutojn. Verŝu la tuton trans kribrilo kaj remetiu en kaserolon kun 2-3 s.k. da olivoleo.

Sur varman teleron deponu la rimenpastaĵojn. Verŝu supren la saŭcon. Dispartigu la detranĉaĵojn de Parmezano kaj ornamu per kelkaj mentaj folioj.

Bonan apetiton !

Elisabeth de Mestral



La Stelo (la Esperanto-klubo de Ĝenevo) proponas :

La 3-an de oktobro :
La Esperanto-Grupo "La Stelo" de Genève invitas vin mardon la 3an de oktobro je la 20a en la stacidomo Cornavin, Salle des conférences 2, kajo 1.

Flugo al Turkio kun Anita por viziti arkeologiajn lokojn kaj naturajn belaĵojn per lumbildoj.

En vol pour la Turquie avec Anita pour visiter des lieux archéologiques et des beautés naturelles, sur diapositives.

La Farmdomo

(Novelo de Pavel Polinski)

... *sekvo* ...

Ĉirkaŭirante la silentan konstruaĵon, kiu fakte estis farmo kun fenestro iome lumigita, li serĉis enirejon kaj indikilon, sed neniu estis, krom simpla pordo de farmloĝejo kaj malantaŭe, fojneja pordego. Fakte ne temis pri la serĉata rendevuejo. Vidante sian eraron, li revenis al la vojnodon kaj, post orientiĝo, ĉar li opiniis la "Farmdomo" laŭmemore sufiĉe proksima de la laga regiono, sub pluvo daŭra li direktiĝis, kien li supozis trovi la rendevuejon. Post retrapaso de la navedreloj kaj vojnodon, ĉiam atenta al la rapida trafiko, kaj trapaso sub aŭtostrada ponto, li sin retrovis marŝante, denove laŭlonge de navedvojo, al direkto de la lago.

Dum li piediris, ĉiam sub pluvo nokta, laŭ la paŝoj, envenis en lian menson: "Kion mi faras tie-ĉi, sola en la nokto, sub pluvo, malsata, kun tiu fiksa ideo enkape: mi devas trovi la "Farmdormo", nepre? Mi komencas laciĝi. Eble estas stulte daŭrigi la serĉadon! Ĉu mi reiru malantaŭen kaj hejmen pere de la navedo?" Sed ĉiam en lian kapon revenis la ideo: "Mi devas trovi tiun "Farmdomo". Ĝi fakte ekzistas. Kial diable mi ne povas trovi ĝin?"

Denove vidiĝis ĉe la maldekstraj supraĵoj la disa, nebula lumo, malantaŭ la nigra desegno de vintra arbaro. Strangan senton li havis. Li

ne estis perdita kaj li bone sciis, kie li estis; sed en tiu-ĉi punkto ŝajnis al li, ke li estis en fremda lando. Kvazaŭ ekster la Mondo, iom duobligita. Lia obstina marŝado alportis lin rando de la tur-kvartalo, kie brilis fenestroj kaj strataj lumigiloj. De tempo al tempo, navedo senbrue preterpasis lin kaj iuj iris loĝejen. La horo estis je la vespermanĝo kaj ĉio vate silentis, sub daŭra pluvo.

Finfine, li alvenis ĉe la ĉefa vojnodon, proksime de la lago. Tiun lokon li bone konis, kie bruege, "fluge", veturiloj direktiĝis al la ĉefurbo, sufiĉe proksima, revenante hejmen. Li deziris trapasi la veturŝoseon por alproksimiĝi al la lago, kaj malkovris, najbare de navedstacio, subtrapasejon. Tiu lasta kondukis lin en parketon kun belaj arboj kaj benko, el kie vojeto direktiĝis rando de la aŭtostrado. Bariloj ne permesis pli antaŭeniri. Retroirante, li sin denove trovis ĉe la navedstacio de la tur-kvartalo. Refoje alvenis la laceco kaj penso: "Kion mi faras tie-ĉi?" Ne longe, ĉar la fiksa ideo galope revenis kapen, plue puŝante lin antaŭen. Tial, marŝante laŭ ĉefa aŭtovojo, li alvenis ĉe la Urbo, kie fera arbo, montrilsage staras kiel gardisto. Kaj jen, la montrilo por la "Farmdomo"! Bone!

Ĉiam sub pluvo, daŭre puŝante rando de la Urbo, li alvenis ĉe loko jam konata; la navedstacio, kie li estis komence de sia marŝado.

Tutapude de lumigita konstruaĵo eliris gejunuloj, irante al la stacio proksima. Kion fari? Momente li hezitis, sentante reveni la laceco kaj la demando: "Ĉu mi plu esploru?". Tamen, okulserĉante tra la obstina pluvofalo, piede de la monteto, kie li staris, li rimarkis, iom lumigitan tra la arboj ĉirkaŭantaj, konstruaĵon grandparte lignan, kiu ŝajnis farmo. "Eble ĝi estas la serĉata "Farmdomo", pensis li. Esploreme, li malsupreniris la krutaĵon, ĝis li atingis ponteton: jen granda konstruaĵo, ĉirkaŭita de pavimita korto. Tute proksime, fontano tegmentita aŭdigis sian dolĉan voĉon: kaj jen! Ligna ŝildo ĉe la muro: La "Farmdomo"!

"Finfine, mi trovis ĝin, valoris la klopodado", li gratulis sin mem. Nu, li provis eniri la grandan lumigitan salonon senhoman, kiun li vidis tra la fenestropordoj. Sed ĉio estis ŝlosita. Ĉirkaŭante la "Farmdormo", li trovis malantaŭe pordon, kiu povus direkti al la ĉambro homplena, kiun li ŝajnis vidi tra la kurtena pluvofalo. Li tute ne certis, estis kiel en sonĝo.

Do, puŝante la pordon, iom rezisteman, li sin trovis en speco de deponejo laborilplena, kiu fakte estis la antaŭeniro al la granda salono jam vidita unue. Strange! Neniu pordo estis videbla kondukante al la supozita ĉambro homplena. Lia rigardo ĉirkaŭis la salonon kaj li malkovris, aliflanke de sia alvenloko, pordeton, kiun iom

kaŝis granda kurteno brunruĝa. Li staris sur scenejo! La pordo estis malfermita kaj aŭdiĝis voĉoj je la supera etaĝo, kien kondukis la ŝtuparoj.

Tiuj voĉoj alproksimiĝis kaj aperis juna paro, kiu mire rigardis lin. "Kion vi faras ĉi-tie, kiamaniere vi eniris?", ili demandis. "Sed per la pordo", respondis li. "Kiun pordon? Ĉio estas ŝlosita!", miris la gejunuloj. Johano kondukis ilin al la pordo, per kiu li estis enirinta. "Strange, fakte ĝi estas ne ŝlosita", ili konsentis. "Sed kion vi serĉas? estas nenio tie-ĉi", daŭrigis ili. "Ĉu ne okazas nun arkeologia prelego en iu ĉambro?" demande respondis Johano. "Ne, ni konfirmas al vi, ke nenio okazas nun en la domo. Sed se vi deziras iom atendi, baldaŭ okazos interesa teatraĵo", estis la respondo. Tio seniluziigis nian heroon. Li ne estis veninta por teatra vespero. Estis malfrue por la prelego, kiu fakte ne okazis. Li estis malsata kaj laca. Li dankis la gejunulojn pri la invito, senkulpiĝante pri sia eraro, preferante reveni hejmen.

Kune ili forlasis la "Farmdormo", kaj denove sub nokta pluvo, li direktis siajn paŝojn al la proksima navedstacio, el kiu li rapide reheimiĝis. Daŭre, en lia memoro, tiu aventuro restis kiel sonĝo!

(Fino)

Pavel Polinski